# Dankon, sinjoro prezidanto redaktoro!

*Franz-Georg RÖSSLER*

Fine de la oficperiodo de profesoro d-ro *Rüdiger Sachs* kiel prezidanto de ISAE kaj redaktoro de Scienca Revuo, mi kiel ano de la asocio same kiel kontribuanto al la revuo sentas bezonon, emon, eĉ devon esprimi dankon por lia bona laboro kaj por la agrabla interpersona kontakto.

Per kelkaj memoraĵoj mi volas malperdigi kelkajn eventojn kontakte kun li kaj teni vivaj specialajn trajtojn, eble se marĝenaj, tamen karakterajn. Ĝeneralajn laŭdojn pri liaj multflankaj kapabloj, koheran priskribon de la privataj kaj oficialaj eventoj verku homoj, kiuj lin pli intime, pli longe, pli fake konis.

Tie ĉi mi volas aldoni kelkajn sporadajn, sed foje decidajn punktojn en mia rilato kun d-ro *Sachs*. Pri lia prezidanteco, lia asocia laboro mi malmulton scias, kaj mi ne povas serioze taksi ĝin kadre de la asocia historio. Sed mi povis konstati en ĉiaj tiaj okazoj lian fervoron por la prosperigo de la asocio, lian prudentan, paciencan kaj diplomatian konduton rilate al malentuziasmaj same kiel al troe ardantaj anoj.

## Instiganto

Evidente *Rüdiger Sachs* disponas pri multaj kvalitoj. En mia okazo *Sachs* ludis la rolon de la "granda instiganto", homo, kiu kapablis veki intereson kaj laboremon por kontribuoj prelegaj en konferencoj de ISAE kaj artikoloj por Scienca Revuo.

Nia unua persona renkontiĝo okazis verŝajne en la Berlina Kongresa Centro, kiam mi prelegis sub lia prezidado kadre de la ISAE-kunveno dum la Universala Kongreso 1999 pri "Simetriaj strukturoj en la muziko". La resumo aperis samajare en Scienca Revuo.

Plifortiĝis la kontaktoj, post kiam li en la jaro 2000 estis surpreninta ankaŭ la postenon de la redaktoro de Scienca Revuo. Tiam li instigadis al la verkado de kontribuoj, peto, kiun mi volonte, sed probable por li tro malofte plenumis. Ekzemple li volis instali konstantan "Lingvan angulon", al kiu mi nur kvarfoje kontribuis, sed ne daŭrigis serioforme. Tamen dum sia pli ol dekjara deĵorado li povis enkonduki kadre de ISAE-kunvenoj en 6 prelegojn de mi kaj publikigi ĉ. 18 artikolojn miajn en SR. Krome kreiĝis kelkaj muzikaĵoj cele al komuna kantado dum konferenco, kaj resumo en Kongresa kuriero Bjalistoko 2009 "ISAE kaj sciencamikoj kunvenis". Mia edzino *Rita Rössler-Buckel* prezentis temojn kvarfoje dum konferencoj, kvar artikolojn en SR kaj plurfoje diverstekni-kajn bildojn.

## Jubilea kongreso "100 jaroj ISAE"

ISAE en 2006 centjariĝis, maksimuma defio por ties prezidanto, inspiranto kaj fronta laboranto. Prezidanto *Sachs* invitis al konferenco en sian kasteleton en *Tavoleto* / Italujo, kiu optimume taŭgis kiel konferencloko kaj kunvenejo. *Sachs* sukcesis altiri multajn membrojn plus kelkajn funkciulojn de UEA, de aliaj organizaĵoj kaj politikistojn. La jubileaj eventoj, la serioza etoso de la prelegoj, la gajaj babiladoj, la informoriĉaj ekskursoj, la kulturaj eventoj restos en la memoro de la partumintoj.

Cetere, tiam prof. *Helmar Frank* lastafoje aperis sana en la publiko. Mi rimarkis, ke li, ŝanceliĝante inter impeta agademo kaj laca eksveno, malbone fartas. Prof. *Sachs* gvidis lin trankvile kaj nerimarkite al lito por ripozigi lin. Du tagojn poste ni eksciis pri lia neevitebla apopleksio.

Per la saĝa preparado, la laŭvorte familiara etoso, kreita de la propraj familianoj edzino kaj filinoj, kaj nelaste la malavara disponigo de sia propra hejmo prof. *Sachs* unualoke kontribuis al la granda sukceso de la Jubilea konferenco. Ĝi memkompreneble speguliĝis en la asocia organo Scienca Revuo. Sub la titolo "ISAE 1906 – 2006 Centjariĝa Festkajero" la redaktoro *Sachs* aperigis la prelegojn, respektive ties resumojn.

## Rikardo Ŝulco

Kvankam ne decidite ano de la Analiza skolo, la poliglota sciencisto *Sachs* havas fajnajn sentojn por la nuancoj de la aktuale utiligata lingvaĵo de Esperanto, aparte por ties malkonsekvencaj kaj

arbitraj flankoj. Konscia pri la abundaj eblecoj de regula Esperanto, li nepre volas restigi ĝin unueca, logika, fidinda, universala.

Same norda Germano kiel Rikardo Ŝulco, li tamen agadis iom pli moderema ol la ofte insultata "maljuna instruisto". Rudigero Sakso montriĝis simpatianta al multaj Ŝulcaj klarigoj kaj proponoj kaj tial senplende allasis, ja bonvenigis miajn prelegojn kaj artikolojn rilate tiun ĉi temon.

Li eĉ subtenis la ideon organizi Memorigan konferencon kadre de ISAE pri Rikardo Ŝulco kaj okazigis ĝin dek jarojn post ties morto, de la 6-a ĝis la 10-a de oktobro de 2007, en sia Tavoleta domego. Al tiu li mem ne nur organize, sed ankaŭ prelege multe kontribuis: salutoj, enkondukoj, gvido de prilingvaj diskutrondoj, gvido de ekskursoj ktp. Li prelegis i.a. pri "La juna Ŝulco" kaj "La Lingvo internacia estas esence scienca". Poste li aperigis eldonaĵon de SR kiel "Memorkajeron Rikardo Ŝulco" en kiu apud aliaj aperis pluraj el niaj koncernaj artikoloj.



**Bildo 1**: La ISAE-prezidanto Rudigero Sakso kun sia edzino Kristino dum la centjariĝa festo de la Asocio (*Tavoleto*, 2006)

Mense malferma, li ne simple sekvis trudiĝemajn lingvoŝablonojn kaj memfidajn orgojlajn antaŭjuĝojn, sed fervore esploris kaj utiligis la Zamenhofan donacon de logika lingvaĵo forme de Esperanto. Kaj tio inkludis ankaŭ plezurigan lingvan ludemon ĉirkaŭ la limoj de internacie komprenebla regula lingvaĵo.

## La homo

Dum la kunaj laboroj, komuna vojaĝo trans la Alpojn kaj la du iom pli longaj kunestadoj en *Tavoleto* ni iom konatiĝis kun la personeco de *Rüdiger Sachs*. Li, tiam jam antaŭ la okdekaj vivojaroj, konservis imponan forton, laboremon, viglecon, klarecon, elradiis ekflamigan energion. Dum promenadoj en la regionaj montoj li ne evitis longajn distancojn kaj foje eĉ nin pli junajn homojn egalis en la pena ascendo al vojkulminoj. Kaj ekskursante al Adriatika maro li estis la unua en la akvo. La kapon antaŭe li plonĝis antaŭ niaj okuloj en la oktobre malvarman akvon. Li rakontis, ke Italoj mokas pri li: "Tion nur faras fanatikaj Germanoj".



En tiu ĉi loko li ankaŭ instruis nin ektrovi kaj ŝati artoformajn ŝtonaĵojn, kiajn li konservis en sia hejmo, pri kiuj li jam dufoje atentigis en SR. Instigite de tiuj naturaj artaĵoj, mia edzino *Rita* kreis tutan serion da ciferecaj grafikaĵoj. Lia invito al plurtaga restado en lia Tavoleta kasteleto donacis al ni neforgeseblajn memorojn. Kvazaŭ el agla nesto ni povis svarmi en la nature kaj kulture riĉan ĉirkaŭaĵon aŭ ĝui hejmece la Saksajn kolektaĵojn artajn kaj literaturajn.

Resume, por ne fini per ĝena laŭdado homon ankoraŭ meze de la vivo, mi volas danki al li pro la tempo, kiun li donacis, kaj pro la impulsoj kaj la eblecoj, kiujn li havigis al ni. Danki precipe ankaŭ pro lia konsiderinda kaj influoplena entreprenemo en la progresigado de la Lingvo internacia. Esperanto vivas ĉiam ankoraŭ de unuopuloj, kiuj memdone laboras. *Rüdiger Sachs* estis dum sia oficperiodo modela laboranto same por la scienco kiel por Esperanto, restante ĉiam fideble agrabla homo. Dankon ŝuldas al li la tuta Esperantistaro.

*Franz-Georg Rössler*
*Am Mönchsbusch 6,*
*DE – 67373 Dudenhofen,* Germanujo
<rozsas@web>

La aŭtoro rezignis pri datoj kaj detala listigo de la diversaj eventoj kaj kontribuoj prelegaj, artikolaj, bildaj kaj muzikaj menciitaj en la artikolo. Ili troviĝas en la jenaj dokumentaĵoj:

| | |
|---|---|
| *Rita Rössler-Buckel*<br>*& Franz-Georg Rössler*<br>**Rikardo Ŝulco. Memoro 2007**<br>Libro kaj KD pri Ŝulco Rikardo<br>*Edition Antiphon Speyer* / 2010 | *Franz-Georg Rössler*<br>*& Rita Rössler-Buckel*<br>**25 jaroj kun Esperanto (1985 – 2010).** Agado kaj produktoj en kaj pri Esperanto. Eldonejo Antifono, Spiro, 2010 |